Solvo de la hejmtasko, 11 aprilo 2011

50-a paĝo: *Respondu*

Kion prenis Maria el la pakaĵo? —Maria prenis ĉion el la pakaĵo.

Kio restis en la pakaĵo? —Nenio restis en ĝi.

Ĉu ĉiu floro estas rozo? —Ne. Ĉiu rozo estas floro, sed ne ĉiu floro estas rozo!

Kion faris la patrino, kiam ŝia infano ne volis dormi? —Ŝi dormigis la infanon.

Kiam vi amikiĝis kun via amiko? —Ni amikiĝis antaŭ tri jaroj.

Per kio komenciĝas (finiĝas) la tago? —La tago komenciĝas per mateno kaj finiĝas per vespero.

Kiam vi fariĝis lernanto? —Mi fariĝis lernanto kiam mi komencis lerni.

Kiujn sezonojn havas la jaro? —La jaro havas kvar sezonojn: vintro, printempo, somero kaj aŭtuno.

Kiam komenciĝas printempo? —Printempo komenciĝas la dudek-unuan de Marto.

Kiam maturiĝas fruktoj? —Fruktoj maturiĝas aŭtune (en aŭtuno).

Kiun sezonon vi ŝatas? —Mi ŝatas ĉiun sezonon!

Kial? —Ĉar ĉiu sezono estas bela en sia maniero.

Kiu sezono estas la plej varma? —La plej varma sezono estas somero.

Kiu sezono estas nun? —Nun estas printempo.

50-a paĝo: *Kompletigu*

La jaro komenc**iĝas** la unuan de januaro kaj fin**iĝas** la 31-an de decembro.

Kiu malpur**igis** la tabulon?

Pur**igu** ĝin per akvo!

Hodiaŭ mi havis multe da laboro kaj mi lac**iĝis**.

La patrino plen**igis** botelon per akvo.

Kio komenc**iĝas**, tio ankaŭ fin**iĝas**.